

## KVINA RENDEVUO DIDAKTIKA:

### Perkoda analizo de pens-unuoj

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1992 februaro 20 & 22

Cl.- Svisa Radio Internacia invitas vin hodiaŭ al kvina rendevuo didaktika kun gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND.

La kvar antaŭaj rendevuoj okazis en decembro 1990 kaj januaro 1991. Ili vekis grandan intereson. Multaj aŭskultintoj petis la alsendon de fotokopio de la koncernaj elsendoj kaj la revuo "Literatura Foiro" havis la bonan ideon ilin publikigi.

A.- Ĉiuj interesatoj apogis nian provon klarigi la esperanto-gramatikon forlasante almenaŭ provizore la greklatinan terminologion klasikan, kiu estas didaktike pli malhelpa, ol oni ĝenerale imagas.

Cl.- Ni provis montri la avantaĝon de kodnombroj por la analizo de la vort-funkcioj en pens-unuoj.

A.- Mi provu tre dense resumi, kion vi instruis en la antaŭaj rendevuoj. Frazo dividiĝas en pens-unuoj, kies kern-vortoj estas facile rekoneblaj. Ilin karakterizas la verbaj finaĵoj **us, os, as, is, u** kaj **i**. Kode tiuj **kern-vortoj** ricevu la nombron **0**. Poste en ĉiu pens-unuo ni distingu inter la subjekta kaj la nesubjektaj funkcioj. Per tre paroliga bildo vi donas la simbolan nomon **piloto** al la **subjekto**. Oni bone distingu la **pilotan funkcion**, kiu ricevu la kodan nombron **1**, de la **nepilotaj funkcioj**, kiujn karakterizas ĉu la **marko n**, ĉu **prepozicio**, ĉu la finaĵo **e**, ĉu vorto sen finaĵo. Al la vorto kun la marko **n** oni donu la kodan nombron **2**, al tiu, kiun enkondukas **prepozicio**, la nombron **3** kaj al tiu kun la finaĵo **e** la nombron **4**. La saman nocion nepilotan esperanto povas esprimi plurmaniere kaj ni konsciigu la lernantojn pri tio. Vi donis ekzemplon kun la formulo **Ni parolas esperanton**, kodo **102**, kiu ankaŭ povas formuliĝi: **Ni parolas en esperanto**: kodo **103** kaj **Ni parolas esperante aŭ ni parolas esperantlingve**: kodo **104**.

Cl.- Post via tre bona kaj kompleta resumo ni forlasu la teorion por la praktiko. Por tiu kodnombra analizo de la frazelementoj ni ekzameni poemon de Johan VALANO, kiun ni ĉerpis el la poemaro **Malmalice** eldonita de **Literatura Foiro** en 1977. **Ferie** estas ĝia titolo. Vi bonvolu laŭtlege ĝin!

A.-	<b>Agrable</b>	<b>Najbara</b>	<b>Nur bruas</b>
	<b>sur sablo</b>	<b>la maro</b>	<b>la skuo</b>
	<b>mi kuŝas,</b>	<b>sin rulas</b>	<b>de 1' ondo,</b>
	<b>kontente</b>	<b>kaj luma</b>	<b>forestas</b>
	<b>la vento</b>	<b>sub suno</b>	<b>la resto</b>
	<b>min tuŝas.</b>	<b>min lulas.</b>	<b>de 1' mondo.</b>

Cl.- Mi tuj diru, ke la kodnombra analizo ne dependas de antaŭa kompreno de la teksto. Kun esperanto-komencantoj mi unue plurfoje korse legigus la poemon flegante la prononcon. Kaj tuj poste, sen okupiĝi pri la nivelo de la kompreno de la analizota poemo, mi serĉigus la kernvortojn, rememorigante, ke ilin karakterizas la finaĵoj **us, os, as, is, u** kaj **i**.

A.- En la poemo **Ferie** ni trovas la kern-vortojn **kuŝas, tuŝas, rulas, lulas, bruas, forestas**.

Cl.- Sub ilian finaĵon **as** ni skribu la kod-numeron **0** kaj ni profitu uzi tiujn verbojn en frazoj, por ke la lernantoj bone komprenu la ekzaktan signifon de la ses kernvortoj. Bona ekzerco estas elekti por ĉiu kernvorto po 5 el la ekzemploj donitaj de Plena Ilustrita Vortaro.

A.- Por **kuŝas** ni trovas tiujn ĉi ekzemplojn: **Ĉiuj ankoraŭ kuŝas en profunda dormo. Li kuŝas senveste. La granda sinjoro kuŝas malsana. Ili tie kuŝas senvivaj.**

Cl.- La ekzisto de la ses kern-vortoj **kuŝas, tuŝas, rulas, lulas, bruas** kaj **forestas** signifas, ke la poemo konsistas el ses pensunuoj. Por ĉiu pens-unuo ni unue serĉu la **piloton**, metante sub ĝin la kodnumeron **1**. Ni ĉiam diru la piloton en la vortordo trovita, ĉu antaŭ ĉu post la kern-vorto.

A.- Por la poemo **Ferio** tio donas: **mi** kuŝas. **La vento** tuŝas. **La najbara maro luma** rulas kaj lulas. Bruas la **skuo de 1' ondo**. Forestas **la resto de 1' mondo**.

Cl.- En kurso ni kontrolu tiam, ke la kursanoj komprenas la signifon de la vortoj, kiuj konsistigas tiujn pilotojn. Se necese ni serĉu ekzemplojn en PIV. Poste pensunuon post pensunuo ni okupiĝu pri la restantaj vortoj, trovante ilian kodnombron.

A.- **Agrable** ricevu la nombron **4**, **sur sablo** ia nombron **3**. La kodo de la pensunuo **Agrable sur sablo mi kuŝas** estas do **4.3.1.2**. **Kontente** ricevu la nombron **4**, **min** la nombron **2**. La kodo de la pensunuo **kontente la vento min tuŝas** estas do **4.1.2.0**. **Sin** ricevu la nombron **2**, **sub suno** la nombron **3**, **min** la nombron **2**.

Cl.- La kodo de la du kunigitaj pensunuoj **Najbara la maro sin rulas kaj luma sub suno min lulas** estas do **1.2.0** kaj **1.3.2.0**.

A.- Sekvas la vorto **nur**, kiu ne havas finaĵon. Ĝi ricevu la nombron **5**, ĉar ĝi estas nek kernvorto nehavante la necesan verban finaĵon, nek piloto. Do ĝi estas nepiloto, kiun karakterizas nek la marko **n**, nek **prepozicio**, nek la finaĵo **e**.

Cl.- La revuo "Literatura Foiro" en sia numero 133-a publikigis humurplenan bildon de la pens-veturilo, kiun mi priskribe proponis. Sur ĝi la sidlokon 1 okupas la piloto kaj sur la aliaj lokoj 2, 3, 4, 5 sidas pasaĝeroj aŭ nepilotoj. La pasaĝero sidanta sur la 2-a loko havas valizon kun la litero **n**, la pasaĝero sidanta sur la 3-a loko tenas korbon kun **prepozicioj**, la pasaĝero sidanta sur la 4-a loko havas sakon kun la litero **e**. La lasta pasaĝero sidanta sur la 5-a seĝo tenas nenion. Tio konkretigas la vortojn sen finaĵo kiel **nur, nun, hodiaŭ, kiam**, ktp. Mi estas certa, ke tiu desegnaĵo didaktike helpa, de Giancarlo Mangini, baldaŭ troviĝos en multaj lernolibroj kaj afiŝe en kursejoj.

A.- La vorto **nur** ricevu do la nombron **5**. La kodo de la pensunuo **Nur bruas la skuo de 1' ondo** estas do **501**. Kaj la kodo de la lasta pensunuo **forestas la resto de 1' mondo** estas **01**.

Cl.- Kiam tiu analizo de la vortfunkcioj estas finita kaj la signifo de la pensunuoj pli malpli komprenata, tiam alvenas la momento efektiviĝi vicon da revortigaj ekzercoj. Ni reprenu la unuan pensunuon kun ties kodo:

A.- **Agrable sur sablo mi kuŝas. 4.3.1.0.**

Cl.- Ni ŝanĝu la vicon de la kodciferoj kaj la lernantoj revortigu laŭ ĝi la koncernan pensunuon. **1.0.4.3.**

A.- **Mi kuŝas agrable sur sablo.**

Cl.- **3.1.0.4.**

A.- **Sur sablo mi kuŝas agrable.**

Cl.- **1.3.4.0.**

A.- **Mi sur sablo agrable kuŝas.**

Cl.- Tre produktiva estas tiu kodŝanĝa ekzerco por paroligaj ekzercoj. Ekzemple mi povus alimaniere rekodigi la tutan poemon, kaj la lernantoj amuziĝus revortigi ĝin laŭ miaj kodindikoj.

A.- Oni povas ankaŭ devigi la lernantojn fari transform-ekzercojn. Ekzemple **Kontente la vento min tuŝas**. Kodo **4.1.2.0.** povus fariĝi **3.1.2.0.**, kaj la lernantoj devus trovi la formulon **Kun kontento la vento min tuŝas**.

Cl.- Sen unu sola gramatika vorto grek-latina ni povis ne nur komprenigi kun granda klareco la strukturan konsiston de la pensunuoj de la tuta poemo, sed krome ankaŭ laŭvole proponi novajn reformuladojn. Tiu didaktiko estas tre produktiva kaj ŝatata de la gelernantoj, kiuj ricevas pere de ĝi kvazaŭ radiografion de la analizitaj tekstoj.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Se la koncerna rendezuo didaktika kun Claude kaj Andrée GACOND vin interesis, vi povas skribi, por peti fotokopion de tiu elsendo. Ĝis reaŭdo!